ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Dritter Jahrgang ★ Nr. 9, September 1950

Die alljährlichen Gipfelpunkte

Zum dritten Mal PARIS

Der 35. Universala - ein voller Erfolg

Endlich habe ich Verbindung! Ich warte sehnlichst auf deinen Kongreßbericht!

Verzeih, aber ich konnte nicht! Stell dir doch vor, es geht mir wie in dem Märchen, wo sich einer durch eine dicke Mauer von Süßigkeiten durchessen muß. Ich bin noch lange nicht durch.

Heißt das etwa, du hättest noch keinen Bericht über Paris fertig?

Leider, ja!

Nun, so gestatte, daß ich einiges frage. Denn du weißt ja, EP ...

Natürlich, ich sehe das ja vollkommen ein. Also frage!

Der 35. fand also vom 5. bis 12. August 1950 in Paris statt. Wieviele Teilnehmer und wo hauptsächlich?

Das weiß ich zufällig ganz genau: 2325 aus 36 Ländern. Viel, nicht wahr? Rund 700 Teilnehmer mehr als 1932, wo wir zusammen dort waren. Und im übrigen war die feierliche Eröffnung auch wieder in der Sorbonne, diesmal auch der „Abend der Bekanntschaften".

Sveda „KELI"-omnibuso en Parizo. (Foto: P. Hübner)

Also der „Interkonatiĝa vespero"?

Beinahe. Er war diesmal kürzer, sprachlich nämlich: Interkona vespero.

Wie war denn die Organisation?

Es klappte, aber es war keine leichte Aufgabe für unsere Pariser Samideanoj, den Ansturm zu bewältigen, der sich wie eine Springflut über sie ergoß. Du weißt ja: dann sind die Leute müde und abgespannt von der Reise, möchten gern ihr müdes Haupt usw.

Ja, vollkommen. Wenn es dann schnell und reibungslos geht — davon hängt manchmal die Stimmung während des ganzen Kongresses ab.

Stimmt. Wie gesagt, ich habe kaum Klagen gehört.

War die Eröffnung wieder so wie seinerzeit 1932?

Ja. Das Amphitheater der Sorbonne war nur noch voller. Einige Minister waren zugegen, ein stellvertretender Generalsekretär der UNESCO, die natürlich alle sprachen. Den Glanzpunkt aber bildete die Rede von Prof. Dr. Lapenna. Es war die würdige Fortsetzung der Zamenhof- und später der Privat-Kongreßreden.

Wir waren 1932 oben auf den Dachgärten der „Galéries Lafayette".

(Fortsetzung auf Seite 72)

LA PETSKRIBO

Oficiala transdono al UNO la 2-an de Aŭgusto 1950 en Lake Success, ĉambro 13 de la Sekretariejo — Paroladis 6 esperantistoj el 6 diversaj landoj

El letero de D-ro W. Solzbacher, prezidanto de EANA (Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko) al s-ro E. Malmgren, prezidanto de UEA, de la 2-a de Aŭgusto 1950 ni ĉerpas jenon:

La transdono de la UEA-Petskribo al la Unuigitaj Nacioj okazis hodiaŭ, la 2-8-1950, je la dua kaj duono en Lake Success, en la konferenca ĉambro n-ro 13 de la UNO-sekretariejo. Kvar albumojn enhavantajn ĉiujn kolektivajn subskribojn kaj la plej gravajn individuajn akceptis nome de UNO s-ro Benjamin Cohen, de Cilio, Helpa Ĝen. Sekretario de la Unuigitaj Nacioj kaj Estro de ĝia Departemento de Publika Informado.

Ses membroj de la Esperanto-Delegitaro faris paroladojn en Esperanto kaj en Angla, Franca, Hispana kaj Rusa lingvoj. Nome de UNO la Helpa Ĝenerala Sekretario deziris plenan sukceson al la klopodoj de la Esperanto-movado. Li promesis oficiale informi la Ĝeneralan Direktoron de UNESCO, s-ron Jaime Torres Bodet, pri la transdono de la Petskribo. Li diris, ke li komprenis preskaŭ ĉion, kion ses esperantistoj — naskitaj en ses diversaj landoj — diris en Esperanto. Li aldonis, ke la flueco, kun kiu ili parolis la lingvon, forte impresis lin. S-ro Cohen dankis la Esperantistojn por ilia promeso labori por internacia kompreno, tiamaniere faciligante la klopodojn de UNO.

La programo de la ceremonio estis jena: S-ro Mark Starr, Eduka Direktoro de la Sindikato de Laboristoj pri Virinvestoj, Vicprezidanto de la Komitato de l'Usona Registaro por Edukaj Interŝanĝoj kaj Prezidanto de l'Usona Delegitaro al UNESCO-Konferenco pri Edukado de Plenkreskuloj en 1949, parolis Angle kaj Esperante, rakontante pri siaj propraj spertoj kun Esperanto en Japanujo, Rusujo kaj aliaj landoj. Li diris, ke facila kaj neŭtrala helpa lingvo ebligas internaciajn rilatojn al personoj sen specialista lingva studado kaj ke Esperanto montris sian plenan taŭgecon por tiu celo. En la historio de la Esperanto-movado s-ro Starr certe

estos konata kiel la unua, kiu faris paroladon Esperantan en la centro de UNO.

La dua parolado estis tiu de D-ro William Solzbacher. Li parolis unue Angle, poste France kaj fine Esperante. Nome de UEA kaj de la 16 350 212 personoj individue aŭ per siaj organizoj subtenintaj la Petskribon, li petis ke la UN atentu kaj studu la spertojn jam faritajn pri la praktika uzado de Esperanto kaj ke ili subtenu pli vastan aplikadon en estonteco. D-ro Solzbacher menciis la plej gravajn individuajn kaj kolektivajn subskribojn dirante, ke kvankam la grandaj asocioj kun centmiloj da membroj estas la plej gravaj, studo de la listo de l' aliaj subskribintoj montras la surprizan variecon kaj multflankecon de la intereso por Esperanto. Kiel ekzemplojn li nomis tri landojn: Norvegujon, Brazilon kaj Japanujon. Li ankaŭ rememorigis la diskutojn pri Esperanto en la iama Ligo de Nacioj, dirante ke ties raporto pri „Esperanto kiel Internacia Helpa Lingvo" (1922) meritas la intereson de la UN kaj ke la formulo uzita en rezolucio de la Ligo en 1924: „Esperanto kiel praktika helpa lingvo por internaciaj rilatoj, flanke de la naciaj lingvoj uzataj" eble estos inda jé konsidero en la UNO.

Sekvis paroladeto de s-ro Myron Mychajliv, iama redaktoro de „Ukraina Esperantisto", en Rusa lingvo kaj Esperanto. Poste s-ro Floreal Conchado, fakdelegito de UEA por Hispanlingvanoj, paroladis Hispane, Angle kaj Esperante.

Prof. João B. Mello e Souza el Rio de Janeiro, Prezidanto de la Brazila Skolta Asocio kaj iama Generala Sekretario de la Brazila Esperanto-Ligo, faris treege impresan paroladon, unue en Franca lingvo, poste en Esperanto, montrante la neceson de Esperanto por lando, kies lingvo ne estas multe studata eksterlande.

La finan paroladon faris s-ro H. Sloan, Prezidanto de la Konsila Komitato de EANA. Unue li parolis Esperante, poste Angle, kaj laŭtlegis la tekston de la Petskribo. Li diris, ke la Esperanto-movado ne nur prezentas peton al UNO, sed ke ĝi ankaŭ promesas sian helpon en la plifaciligo de la internacia kompreno, unu el la esencaj taskoj de UNO.

Inter la membroj de la Speciala Delegitaro por la Transdono de la Esperanto-Petskribo troviĝis ankaŭ s-ro James D. Sayers, Komitatano de UEA, aŭtoro de „Invito al ĉielo".

EN ROMO

sur la Kapitolo

okazis la solena malfermo de la 22-a Internacia Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj

Mian unuan intencon, partopreni la supre nomatan kongreson, mi bedaŭrinde ne povis efektivigi, ĉar ĝis la lastaj tagoj antaŭ ĝia melfermo oni ankoraŭ ne sciis, ĉu partopreno estos ebla; kaj por ne perdi la eblecon ĉeesti en Romo je tiu tempo, mi devis jam multe pli frue aliĝi al tiutempe okazigota pilgrimado, t. e. pagi monaton antaŭe la vere ne bagatelan sumon, sed kiu ampleksis ĉiom. Tiuj aranĝoj jam antaŭe fiksitaj kaj okupantaj preskaŭ ĉiun horon en Romo, ne ebligis paralelan partoprenon en la Esperantista Kongreso; bedaŭrinda, sed ne aliigebla fakto. Ke mi tamen partoprenis ĝian solenan malfermon, signifis por mi rezigni la viziton al la subteraj grotoj sub la katedralo de S-ta Petro, al partoj de la Vatikana Urbo k. a.

Do, mi direktis min, la 13-an de aŭgusto je la 10a kaj duono, al la Kapitola Monteto, kie estis okazonta la malferma soleno. Tiun monteton ornamas granda aro da diversaj ŝtuparoj — larĝaj kaj mallarĝaj, krutaj kaj malkrutaj, kaj tute apude tiu al la preĝejo Ara Coeli — vera suprenirilo al ĉiela altaro, kiel diras la nomo. Iun postan vesperon mi ree suprengrimpis ĝin, jam tre laca pro tuttaga streĉa irado kaj rigardado; eksidante fine sur la plej alta ŝtupo, mi havis la impreson sidi sur alta monto ĉe la rando de abismo, en kiun kondukis senfina vico da ŝtupoj. La dolĉa itala nokto estis trapenetrita supre de brilanta stelaro, malsupre de la multegaj brilaj lumoj el la apudaj stratoj kaj la Placo Venecia.

Sed mi ree altemiĝu. Iom post iom kolektiĝis geesperantistoj italaj kaj eksterlandaj. Francajn mi renkontis, aŭstrajn, sinjorinon svedan, nederlandajn sonojn mi aŭdis; hazarde mi ĉeestis tutprivatan itallingvan Esperantolecionon, kiun s-ro Filippetti faris al juna italo. Ili ambaŭ ne sciis ke mi, apude sidante, bone komprenis ilin, kaj mi

Zum dritten Mal PARIS

(Schluß von Seite 71)

Ja, dort gab es diesmal einen 5-Uhr-Tee, aber erst am Mittwoch. An diesem Tage war auch ein — ich muß schon sagen — Massenbesuch im Pariser Rathaus. Wohl drei Viertel des Kongresses war der Einladung gefolgt, obwohl eine „rauschende Ballnacht" vorhergegangen war.

Der Ball war 1932 später, aber ich denke, daß das Vorverlegen recht praktisch war.

War es auch. Die Bekanntschaften konnten gleich vertieft und ausgewertet werden. Der Ball fand in zwei Sälen des luxuriösen Hotels Continental statt, im zweiten Stock und zu ebener Erde. Verbindende Treppen spielen eine große Rolle, du kennst das ja auch von den Kölner Maskenbällen.

Natürlich. Aber jetzt mal eine andere Frage. Wie hat sich denn die Vierteilung des Kongresses bewährt?

Nun, das hat, wie alles, seine zwei Seiten. Einerseits werden dadurch die einzelnen Diskussionen gehaltreicher, kompakter, möchte ich sagen; andererseits wird der Kongreß „zerschnitten", wenn ich mich so ausdrücken darf. Überall kann man bekanntlich nicht gleichzeitig sein, und wehe, wenn man andere Interessen hat als die gewonnenen Freunde und Bekannten. Man kommt dann kaum mehr zusammen.

Aber doch abends!

Gewiß, aber wir Esperantisten wollen eben auf einem Kongreß hauptsächlich Freude; die Arbeit darf ruhig etwas zurücktreten. Nun war es in Paris noch günstig, daß die vier Sektionen in einem und demselben Gebäude tagten. Stell dir mal vor, das wäre anderswo nicht möglich. Die fatale Folge: der Kongreß fiele auseinander.

Du hast recht. Das wird nächstes Jahr in München wohl zu bedenken sein. Und sonst? Somera Universitato?

Natürlich. Es sprachen die Esperanto-„Kanonen" Waringhien, Canuto, Lapenna u. a. über sehr verschiedene und interessante Themen. Aber hör mal, willst du noch viel wissen?

Noch etwas Geduld! Ich hörte bisher einen Namen nicht: Raymond Schwartz. War er nicht dabei?

Selbstverständlich war er dabei, sogar in zwei Kabarettabenden nach dem Stil von Montmartre. Ich brauch dir nicht zu versichern, daß diese Veranstaltungen einzig waren.

Da tut es mir aber wirklich leid, daß ich nicht teilnehmen konnte.

Eine erlesene Schar machte bei UNESCO einen besonderen Besuch, wo sie ein UNESCO-Beamter in ... Esperanto begrüßte, allerdings nicht offiziell, denn die amtlichen UNESCO-Sprachen sind ja nur Englisch, Französisch und Spanisch. Ich gehörte im übrigen nicht zu der „erlesenen Schar".

Ah, das ist interessant. Die UNO hat im August ja auch offiziell die Bittschrift angenommen, sogar in ziemlich feierlichem Rahmen.

Ja, Malmgren wies schon darauf hin. Hoffentlich ernten wir auch einige Früchte.

Ich denke doch. Aber jetzt nur noch einige ganz kleine Fragen. Wo gingen die Ausflüge hin?

Ich nahm, wie schon 1932, an dem nach Versailles teil, um meine Erinnerung aufzufrischen. Es war der einzige regnerische Tag in der Kongreßwoche.

Und was war mit dem Redner- und Literarischen Wettbewerb?

Ich sagte schon, man konnte nicht alles hören und sehen. Ich hörte mir den Redner-Wettbewerb an. Das Thema war: Frieden und Esperanto. Etwa 400 Personen waren zugegen. Aber ich muß jetzt ...

Momentchen noch. Was brachte die Schlußsitzung?

Die war ziemlich kurz und schmerzlos, oder doch schmerzlich, denn für manche war das Auseinandergehen eben nicht so einfach. München wurde als Ort des 36. UK offiziell bekanntgegeben, und mit dem traditionellen „Gis la revido venontjare!" war die Freude wieder einmal zu Ende.

Also war es doch ein Kongreß der Freude?

Ja, sehr! Ich habe noch keinen derart genossen wie den dritten Pariser. Hoffentlich wird der Münchener sein würdiger Nachfolger.

Ja, hoffen wir!



En ĉi tiu palaco, la Kapitolo de Romo, okazis la malfermo de la 22-a Kongreso de Katolikaj Esperantistoj

Bonvenigaj emblemoj en Konstanco. (Foto: Mich. Schmidt)

admiris, kiel klare kaj konvinke nia samideano sciis montri la trafajn motivojn por lerni nian lingvon. Kaj kun ges-roj Minnaja mi konatiĝis kaj kun unu el iliaj du filoj, pri kiuj jam skribis en EP pĝ. 34 s-ano Schulz. Fine aperis ankaŭ patro Carolfi, aminda ĉeffiguro de la katolika Esperantismo, kaj ni povis eniri la destinitan salonon, pompan per valoraj gobelenoj, statuoj kaj du pli ol homaltaj marmoraj vazoj, ornamitaj ekstere per belaj reliefaĵoj. Mi speciale mencias ilin, ĉar oni havis la impreson, ke la voĉoj de la parolantoj ĉe la prezida tablo, direktitaj en mikrofonon, rekte venas el tiuj belaj ujoj.

Ĉe la estrara tablo eksidis: La vic-ĉefurbestro de Romo, dekstre de li la prezidanto de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), maldekstre patro Carolfi. La reprezentanto de Romo malfermis la kongreson per bela itallingva salutparolado, poste liaj du apudsidantoj diris vortojn de bonvenigo.

La parolisto de Radio Roma faris la rolon de anoncisto de la sekvantaj diversaj reprezentantoj naciaj: estis laŭ mia ne tre fidinda takso eble 14 nacioj reprezentitaj: Aŭstrujo, Anglujo (diris, ke ili estas nur malmultaj, sen ia aŭtoritata subteno), Nederlando, Jugoslavujo (kapucena patro kun granda vervo, kies fina „Nia movado vivu, floru kaj kresku!" sonis kiel fanfaro tra la historia ejo), Polujo, Hispanujo, Germanujo, Svedujo, Francujo (fraŭlino), Libera ŝtato Triesto (tre elokventa parolanto), Luksemburgo, Belgujo, ankoraŭfoje Aŭstrujo (transdonis personan leteron de kardinalo Innitzer), Irlando.

Kiel reprezentantoj de la tutmonda junularo kaj de la denaskaj esperantistoj parolis la du filoj de ges-roj Minnaja: estis vera ĝuo aŭskulti tiujn freŝajn junulajn voĉojn, kiuj parolis Esperanton tiel klare kaj bele, ke ĉiu, kiu ĝis tiam ankoraŭ ne konis la belsonecon de nia lingvo, nun povis plene konvinkiĝi pri ĝi.

Patro Carolfi legis fine la multajn alvenintajn telegramajn kaj leterajn salutojn, inter kiuj estis kelkaj de ministroj. Poste finiĝis tiu impresa kongres-malfermo en historia loko. Ni eliris sur la placon kun la bronza rajdista statuo de Mark-Aŭrelo; se mi estus havinta tempon, mi volonte vizitus la riĉan kolekton da antikvaĵoj sur la Kapitola monteto; sed ne povis esti. Post mallonga saluto al kelkaj konatuloj kaj rapida rigardo al la Forumo Romana mi devis rapidi for.

Post kelkaj tagoj mi renkontis hazarde en vagonaro al Frascati du germanajn partoprenintojn. Tio estis, bedaŭrinde, mia tuta kontakto kun la 22-a kongreso de katolikaj esperantistoj. Ceestinto.

Junaj esperantistoj tutmondaj kunvenis en Konstanco ĉe la Ŝvaba Maro

Kolektiĝis 430 esperantistaj gejunuloj el 17 landoj, i. a. Irlando, Finlando, Hispanujo kaj Jugoslavujo.

La ĉefurbestro salutparolis Esperante; okazis tre kora akcepto en la urbodomo; la Alta Komisarejo estis doninta subvencie 1000 gmk.; la Instituto por Internaciaj Renkontoj ebligis senpagan partoprenadon al kvin orientzonaj germanaj kunvenanoj.

El la programo: Solena malfermo nur Esperantlingva, akcepto en la urbodomo kaj rondiro tra la urbo kun urbe pagitaj gvidantoj, radiointervjuo, katolika diservo kun ĉeesto de la urbestro, ŝipekskurso al Bregenz, vizito al Meersburg, ŝipekskurso al la Rejn-akvofalego apud Schaffhausen-Neuhausen, festvesperoj nederlanda, germana, brita kaj franca, fine adiaŭa festbalo — jen telegramstila bildo de la kongreso.

Al UNO oni sendis la sekvantan Kongresproklamon de la 6a Internacia Junular-Kunveno de TJO

Ni gejunuloj el 17 landoj, kunvenintaj ĉe la 6a Internacia Junular-Kunveno de TJO, aŭguston 1950 en Konstanz (Germanujo), konsiderante ke la paco troviĝas aktuale en danĝero kaj ke ĝin nur povas savi la veraj pacemuloj en ĉiuj landoj, direktas la jenan alvokon al ĉiuj bonvolaj homoj en la mondo:

1. Ĉiuj komoj konsciu, ke la tutmonda interfrateco, sendiference de diversaj nacioj, religioj, rasoj kaj politikaj konceptoj, estas la nepra bazo por forigi la militdanĝeron kaj konstrui la veran kaj daŭran pacon, al kiu sopiras ĉiu bonvola homo.
2. Ĉiuj registaroj klopodu reguligi siajn malakordojn pacmaniere. La Unuiĝo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), se ĝi volas konservi la fidon de la pacemuloj, ĉesigu laŭeble perpace la konfliktojn, kiuj nuntempe mortigas homojn en la mondo. La defendo de la paco ne povas esti la afero de unu ŝtato, de unu nacio, de unu politika partio, sed ĝi estas vivdemando de ĉiuj homoj en la mondo.
3. Car uzo de internacia lingvo, kvankam nesufiĉa kondiĉo, estas necesa por la monda paco, la adeptoj de la neŭtrala internacia helplingvo Esperanto konsideru kiel pacanojn nur tiujn, kiuj eklernos la internacian lingvon aŭ almenaŭ aprobos kaj subtenos la esperantistan idealon. Ĉiuj pacemaj registaroj subtenu la instruon de la lingvo Esperanto, precipe en lernejoj, kaj garantiu al siaj civitanoj la rajton lerni tiun lingvon kaj ĝin instrui; ili permesu la kontaktojn kaj korespondadon kun la eksterlandaj esperantistoj.
4. La junaj esperantistoj sin deklaras batalantoj por la paco kaj promesas helpi konkrete per siaj plenaj fortoj por la starigo de la paco, per vigligo de kunlaboro de plej larĝaj popolamasoj en ĉiuj landoj.
5. Ĉiuj sinceraj pacemuloj subtenu la pacan laboron de la Esperanto-movado kaj kunlaboru kun ĝi per ĉiuj rimedoj.

In der nächsten Nummer:

Die Gewerkschaften und Esperanto
Lingva Konsilejo
Lingva Konsultejo mit Aktuala Terminareto
Die Seite, die unsere Leser verfassen, diesmal: Helga und ich
Die Seite für „sie"
Alibioj
Scherz und Rätsel

RIVALEN VON EHEMALS

Volapük und Esperanto

(Schluß)

Wir haben bereits gehört, wie Dr. Zamenhof in seiner 1. Kongreßrede Worte aufrichtiger Anerkennung für den Schöpfer des Volapük fand. Noch einmal soll er hier zu uns sprechen anläßlich des 80. Geburtstages von J. M. Schleyer. Er sagte in seiner Begrüßungsrede beim 7. Esperanto-Weltkongreß in Antwerpen 1911:

... Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegan meriton en nia afero. La prelato **Johann Martin Schleyer,** kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado, por esprimi al ni tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj, senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revi, sed **labori;** dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan **movadon.** Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis **per si mem** en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkutimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro **unu** grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: **absoluta manko de natura evoluipovo;** kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus **tiu** eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus, kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus Volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremeco, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, — tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

... Ich benutze auch die Gelegenheit unseres Festes, um in Ihr Gedächtnis den Namen eines Mannes zurückzurufen, der sich das größte Verdienst in unserer Sache erworben hat. Prälat **Johann Martin Schleyer,** dessen Namen jeder von Ihnen sehr gut kennt, der Erdenker von Volapük, hat vor kurzem die 80. Wiederkehr des Tages seiner Geburt gefeiert. Es wäre unverzeihlich, wenn wir nicht die Gelegenheit unserer jetzigen allgemeinen Zusammenkunft benutzen würden, um ihm diejenigen Gefühle zum Ausdruck zu bringen, die wir alle für ihn hegen. Er ist der wahre Vater der ganzen Welthilfssprachenbewegung. Vor ihm hat man auch schon von einer internationalen Sprache geträumt, aber es waren nur theoretische Skizzen, blasse, körperlose Schemen in der Welt der Träume. Er war der erste, der sich sagte: Für die internationale Sprache will ich nicht träumen, sondern **arbeiten;** während alles ringsumher schlief, war er der erste, der praktisch die Welthilfssprachenbewegung schuf. Volapük wurde nicht vom Esperanto besiegt, wie viele ganz fälschlich denken. Es ging **an sich selbst** in einer Zeit zugrunde, als das ruhig und still arbeitende Esperanto noch zu schwach war, um jemanden zu besiegen, es ging nicht unter wegen seines seltsamen Klanges oder aus anderen ähnlichen Gründen, denn an alles kann man sich gewöhnen, und was gestern noch wild erschien, das steht morgen als etwas ganz Natürliches und Schönes da. Durch langen und vielfältigen Gebrauch wird selbst das wildeste Idiom des barbarischsten Volksstammes nach und nach eine reiche, elegante und bequeme Sprache.

Volapük ging hauptsächlich wegen **eines** schweren Fehlers unter, den es leider in sich trug: nämlich aus **vollständigem Mangel an natürlicher Entwicklungsfähigkeit.** Mit jedem neuen Wort oder jeder neuen Form mußte die Sprache dauernd von den Beschlüssen einer einzigen Person oder von einem unter sich leicht zum Unfrieden neigenden Personenkreis abhängen. Wie an einem in die Erde gepflanzten Stock, so konnten neue Blätter und Zweige auf natürliche Weise nicht an ihm wachsen, sondern mußten beständig daran gebildet und daran geklebt werden. Wenn dieser Fehler nicht gewesen wäre, den man leider nicht verbessern konnte, so wäre Volapük niemals verschwunden, und wir alle würden jetzt wahrscheinlich Volapük sprechen. Aber dieser bedauerliche Fehler, den nicht der Mangel an Talent und Arbeitsamkeit, sondern nur eine zu rasche Veröffentlichung der Sprache ohne genügende

Neuigkeiten

aus der Esperanto-Welt

Esperanto im Unterricht

Vierundvierzig nordamerikanische College-Leiter empfehlen in einer Erklärung „How can Colleges promote international understanding?", Esperanto als „Hilfssprache für eine geeinte Welt" zu unterrichten.

Unter den allgemeinbildenden Pflichtfächern der Staatsbauschule München wird vom kommenden Semester an auch Esperanto als vollgültige Fremdsprache gelehrt werden. Das Interesse für die Welthilfssprache an dieser Schule ist so groß, daß sich in einigen Klassen bis zu neunzig Prozent aller Studenten für Esperanto entschieden haben.

Auch die Universität in Hamburg hat nunmehr ein Lektorat für Esperanto errichtet. Den Lehrauftrag erhielt Dr. J. Weber.

An der medizinischen Fakultät in Tokio müssen die Studenten vor Beginn des Deutsch-Unterrichts Esperanto erlernen.

Das Esperanto-Studium im Königlichen Blindeninstitut in Kopenhagen wird fortgesetzt.

Als erste südafrikanische Schule hat die Technische Schule in Port Elizabeth jetzt Esperanto in ihren Lehrplan aufgenommen. (id)

Katholischer Esperanto-Funk

Der katholische Rundfunksender K. R. O. in Hilversum hat Esperanto in sein Programm aufgenommen. Im Anschluß an den 23-Uhr-Nachrichtendienst folgt jeden Samstag die Sendung „Nachrichten in Esperanto" auf Welle 298 m. (id)

Radio Parizo. S-ano Peters, Koblenz, parolis trans radio Parizo kaj Südwestfunk Baden-Baden germankaj esp.-lingve pri la Pariza kongreso.

Nederlandaj reĝidinoj studas Esperanton. Gazetoj raportas, ke la reĝaj filinoj Beatriks kaj Ireno studas en la publika lernejo de Kees Boeke Esperanton, Latinon kaj matematikon kiel preferajn fakojn.

Justec- kaj kultministro d-ro Süsterhenn kaj Esperanto. Li salutis en la nomo de Rejnlando-Palatino per speciala letero kaj sendito la 35-an Kongreson de Esp. en Parizo.

Esperanto allasata de la sovetzona poŝtadministracio. Supera poŝtdirekcio Dresden sciigas, ke Esperanto nun estas permesata en- kaj eksterlanden.

Zamenhof - memortabulo en Bad Nauheim. Ĝi estas inaŭgurita la 17-an de septembro. Cefurbestro d-ro Voss parolis.

Mortintoj. La vidvino de Lanti, s-ino Limuzin, mortis en Londono 74jara. — Usona pioniro Weder, germandevena, mortis 50jara en Novjorko.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos...

Probezeit bis zur Reife verursacht hatte — dieser Fehler, der Volapük zu Fall brachte, verkleinert in keiner Weise die Verdienste seines Autors, der als erster mächtig die Welt für unsere Ideen aufrüttelte. Die großen Verdienste Schleyers in der Welthilfssprachengeschichte werden niemals vergehen.

Ich schlage Ihnen vor, daß wir gelegentlich seines Festes an Schleyer im Namen der ganzen Esperantistenschaft unseren herzlichen Glückwunsch, unsern Dank für seine große Arbeit und unseren Wunsch übermitteln, er möge noch lange leben in dem Bewußtsein, daß die Früchte seiner Arbeit niemals vergehen werden...

Schleyer starb im Jahre 1912, dem Jahre, da in Krakau das 25jährige Jubiläum von Esperanto gefeiert wurde. Wenn auch unser Meister in seinem „Schwanengesang" nicht ausdrücklich Schleyers Namen erwähnte, so dürfen wir doch sicher sein, daß er auch seiner gedachte, als er sagte:

... fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. ... En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de **ĉiuj** niaj karaj kamaradoj, kiujn... forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

... Eifrig und hingebend arbeiteten viele Personen, die jetzt nicht mehr leben. In Ihrem Namen spreche ich einen Trauergruß aus den Schatten **aller** unserer lieben Kameraden, die der Tod von uns gerissen hat. Ihre Schatten mögen nun vor unseren Augen stehen und so gleichsam teilnehmen an dem großen Fest, das sie vorbereitet, aber nicht erlebt haben. Ich schlage Ihnen vor, daß wir ihr Gedenken durch Erheben von unsern Sitzen ehren.

Und damit möchten wir unsere vergleichende Gegenüberstellung von Volapük und Esperanto, den Rivalen von ehemals, schließen.

Zusammengestellt von Jfb.

Immer dasselbe Lied

Es ist für jeden Esperantisten gut — für den schon vollendeten wie für den noch werdenden —, von Zeit zu Zeit sogenannte „internationale" Tagungen zu besuchen, auf denen Esperanto keine Rolle spielt. Er bekommt dann neben allerlei nützlichen Anregungen wieder das richtige Verständnis für die Größe unserer Idee, für die unabweisbare Notwendigkeit unserer Sache.

Mitte Juli dieses Jahres fand innerhalb der 1900-Jahr-Feier der ehrwürdigen Stadt Colonia auch eine internationale Jugendwoche statt. Jugendliche Vertreter von mehr als einem Dutzend Nationen waren zugegen. Am „Niederländer Ufer" des Rheins war eine bunte Zeltstadt entstanden, die sich um die bei diesem Anlaß feierlich eröffnete „Jugendherberge des Weltfriedens" ausdehnte. Das Gebäude der Jugendherberge, ein ehemaliger Bunker, der zu den besten Kölns gehört hatte, war zweckdienlich umgestaltet und mit einem modernen, vielleicht etwas bizarr wirkenden Glasvorbau versehen worden.

Wenn ein Esperantist einen solchen Ort besucht, so sucht er natürlich in erster Linie nach ausländischen Samideanoj. Es fanden sich aber kaum welche; erklärlich, denn die jungen Esperantisten hatten es vorgezogen, ihre Ferien bei dem internationalen Jugendtreffen in Konstanz zu verbringen, wo es keinerlei sprachliche Hemmungen, kein sprachliches Stolpern auf Schritt und Tritt und kein ohrenbeleidigendes Kauderwelsch gibt.

Solches konnte man in der genannten Zeltstadt um so mehr „genießen". Natürlich gab es auch Jugendliche, die nicht nur eine Sprache leidlich beherrschten, aber im allgemeinen lag die Verständigung sehr im argen, wie nach allen bisherigen Erfahrungen nicht anders zu erwarten war. Einzelne Wörter, abgehackte Sätze, mißverständliche Redewendungen und, wenn alles nichts half, die internationale Sprache der Gesten — das ist der Eindruck, den solche Treffen in sprachlicher Hinsicht machen. Es gibt Leute, die das komisch, interessant, amüsant und zeitungswert finden; ich kann mir nicht helfen, ich finde es nur traurig.

Im Programm dieser Jugendwoche befand sich auch ein Abend, da man an die Jugendlichen der verschiedenen Nationen Fragen stellen konnte. Diese Veranstaltung fand in der Kölner „Brücke", dem englischen Kulturinstitut statt, und wurde auch in der Hauptsache von einem Engländer geleitet, dessen Englisch für uns ebenso schwer verständlich war wie sein Deutsch. Jeder Fragende mußte seine Frage vorher schriftlich einreichen. Sie wurde dann von einigen der ausländischen Jugendlichen beantwortet. Vertreten waren: Belgien, Deutschland, Frankreich, Großbritannien, Holland, Indonesien, Luxemburg, Norwegen, Schweden, Schweiz, Sudan und USA.

Das Verfahren war das eines englischen „Brains trust". Es kamen jeweils Vertreter verschiedener Nationen zu Wort. Verdolmetscht wurde in Deutsch, Englisch, Französisch und Schwedisch, ein langweiliges, langwieriges und dazu noch ungenaues Verfahren. Mindestens ein grober Übersetzungsfehler (wobei das Gegenteil dessen herauskam, was der Redner gesagt hatte) konnte einwandfrei festgestellt werden. Zum Glück verstanden die meisten der Ausländer einigermaßen Deutsch, sonst hätten die Übertragungen der verschiedenen Dolmetscher und Dolmetscherinnen noch einen viel breiteren Raum einnehmen müssen.

Eine — natürlich von uns Esperantisten gestellte — Frage lautete: Warum verwenden die internationalen Jugendverbände auf ihren Tagungen nicht *eine gemeinsame* Vermittlungssprache? Das war wie ein Griff in ein Wespennest. Der englische Vorsitzende — das wußten wir schon von früher her — lehnt Esperanto ab. Es war deshalb keine Überraschung, daß er gleich einem „handfesten" Gegner aus Holland das Wort erteilte. Die Quintessenz aus dessen nicht eben sehr sachkundiger Rede war, daß Esperanto (wer hatte denn übrigens etwas von Esperanto gesagt? Also so weit sind wir doch schon, daß unter einem gemeinsamen Verständigungsmittel nur noch „Esperanto" verstanden wird, auch von seinen Gegnern!) eine „blöde" Sprache sei. Das war alles, was er wußte. Ein Schwede, der von Esperanto anscheinend schon etwas mehr gehört hatte, meinte aber, es sei eine reine Vereinsangelegenheit; ein junger, feuriger französischer Jüngling erklärte sich für eine gemeinsame Vermittlungssprache, betonte aber — sichtlich unter dem Einfluß der in der Versammlung herrschenden anglophilen Atmosphäre —, Englisch, natürlich neben Französisch, würde genügen. Ein sympathischer junger Mann aus Großbritannien war ganz diplomatisch: um nicht als sprachlicher Chauvinist zu erscheinen, meinte er, wenn er schon das Englische nicht für die gedachte Rolle vorschlagen wolle, so könnte es doch — und dabei strich er der neben ihm sitzenden Vertreterin der USA leicht über das Haar — Amerikanisch sein.

Die Stimmung beim Publikum — meistens junge Leute, so an die 150 — war offensichtlich gegen Esperanto. Lächerliche und jeder Sachkenntnis spottende Bemerkungen der Redner wurden stürmisch beklatscht. „Englisch, Englisch über alles!" — das schien die Einstellung der meisten jungen Leute zu sein. Vermutlich handelte es sich bei ihnen um frühere oder gegenwärtige Teilnehmer an englischen Kursen. Da die Art der Versammlung keine Möglichkeit bot, sich zu den einzelnen vorgebrachten Meinungen zu äußern, so mußten es die Esperantisten hinnehmen, daß kein kurzes aufklärendes Wort mehr gesagt werden konnte, z. B. zu dem immer wiederkehrenden irrigen Einwand, Esperanto wolle die Volkssprachen verdrängen oder gar ausschalten.

La grandaj Figuroj de l' Homaro en la kadro de la kalendaro

SEPTEMBRO

En tiu ĉi monato naskiĝis

1452 **Girolamo Savonarola** — eklezia predikisto itala
1518 **Jacopo Robusti, nomata Tintoretto** — itala pentristo
1599 **Francesco Borromini** — itala arkitekto kaj skulptisto
1686 **Cosmas Damian Asam** — germana pentristo
1692 **Egid Quirin Asam** — germana skulptisto kaj arkitekto
1703 **François Boucher** — f anca pentristo
1733 **Christoph Wieland** — germana poeto
1758 **Horatio Nelson** — brita marheroo
1767 **August Wilhelm Schlegel** — germana poeto kaj tradukisto
1769 **Alexander von Humboldt** — — germana natur-esploristo
1774 **Caspar David Friedrich** — romantika pentristo germana
1778 **Clemens Brentano** — germana poeto
1783 **Peter von Cornelius** — germana pentristo
1791 **Theodor Körner** — germana poeto
1803 **Ludwig Richter** — germana desegnisto kaj pentristo
1804 **Eduard Mörike** — germana poeto kaj verkisto
1817 **Theodor Storm** — germana poeto
1824 **Anton Bruckner** — aŭstra komponisto
1828 **Leo Nikolajeviĉ Tolstoi** — rusa verkisto kaj poeto
1829 **Anselm Feuerbach** — germana pentristo
1831 **Wilhelm Raabe (Jak. Corvinus)** — germana verkisto
1834 **Heinrich v. Treitschke** — germana historiisto
1841 **Anton Dvořák** — ĉeĥa komponisto
1854 **Engelbert Humperdinck** — germana komponisto
1857 **Hermann Sudermann** — germana verkisto
1864 **Miguel de Unamuno** — hispana verkisto
1867 **Albert Bassermann** — germana aktoro
1873 **Max Reinhardt (Goldmann)** — germana teatroartisto
1890 **Franz Werfel** — aŭstra poeto kaj verkisto

En ĉi tiu monato mortis

1321 **Dante Alighieri** — klasika poeto itala
1426 **Hubert van Eyck** — nederlanda pent isto
1541 **Philippus Theophrastus Paracelsus** — svis-germana natur-esploristo, kuracisto kaj filozofo
1569 **Pieter Breughel (Bruegel)** — nederlanda pentristo
1658 **Oliver Cromwell** — lordoprotektoro de Anglujo
1764 **Jean Rameau** — franca komponisto
1811 **Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov** — rusa verkisto
1814 **August Wilhelm Iffland** — germana aktoro kaj dramisto
1832 **Walter Scott** — skota poeto kaj verkisto
1836 **Christian Dietrich Grabbe** — germana dramisto
1849 **Johann Strauß (patro)** — aŭstra danc-komponisto
1860 **Arthur Schopenhauer** — germana filozofo
1863 **Jakob Grimm** — germana lingvisto
1883 **Ivan Sergejeviĉ Turgenjev** — rusa poeto kaj verkisto
1885 **Karl Spitzweg** — germana pentristo
1895 **Louis Pasteur** — franca kemiisto, biologo kaj medicinisto
1898 **Theodor Fontane** — germana verkisto
1899 **Giovanni Segantini** — itala pentristo
1902 **Emile Zola** — franca verkisto
1907 **Edvard Grieg** — norvega komponisto
1910 **Joseph Kainz** — aŭstra aktoro
1914 **Hermann Löns** — germana verkisto
1917 **Edgar Degas** — franca pentristo
1918 **Max Dauthendey** — germana poeto
1919 **Ruggiero Leoncavallo** — itala komponisto
1930 **Ilja Jefimoviĉ Repin** — rusa pentristo
1932 **Max Slevogt** — germana pentristo kaj grafikisto

Ich sagte im Anfang, jeder Esperantist müßte auch einmal solche Tagungen besuchen. Dann sieht er nämlich erst, was für ein Unterschied zwischen Esperanto-Kongressen und internationalen Zusammenkünften von Nichtesperantisten besteht. Es ist wie Feuer und Wasser. Man sah es bei der einseitig geführten oben geschilderten Aussprache so manchem Samideano an, daß er nur schwer die Ruhe bewahren konnte. „Jam teni min ne povas mi facile!" Aber die größte Lehre, die wir aus obigem Erlebnis ziehen müssen, scheint mir die zu sein: Immer wieder und wieder auf allen internationalen Zusammenkünften müssen wir auf die Unsinnigkeit hinweisen, ein Mittel abzulehnen, das alle sprachlichen Verständigungsschwierigkeiten aufs einfachste heilen könnte. Wir müssen mutig und unerschrocken unsern Widersachern zu Leibe rücken und sie zu überzeugen versuchen. Wenn wir unsere vernünftigen Argumente nur einigermaßen geschickt vorbringen, dann können die Gegner nichts anderes tun als klein beigeben ... oder sie stehen als offensichtlich hinter der Zeit herhumpelnde sprachliche Chauvinisten da. Und, liebe EP-Leser, Sie wissen ja, es ist nicht schön, altmodisch oder gar rückschrittlich zu erscheinen, besonders wenn man sich, wenigstens innerlich, selbst gestehen muß, daß man es wirklich ist.

Observinto.

DIE Alfred-Rehtz-ECKE

Vorurteile

Mein lieber Freund, Du lächelst spöttisch,
Wenn's sich um Esperanto dreht.
Man darf nicht Vorurteile haben,
Wenn man die Wahrheit suchen geht;
Dann braucht man sachliche Belehrung.
Verschließ' auch Du ihr nicht das Ohr!
Was ärgert Dich an dieser Sprache?
Was wirfst Du eigentlich ihr vor?

Du meinst, sie will den Landessprachen
Vielleicht ein Nebenbuhler sein
Und ihnen Abbruch tun? Wer redet
Dir dieses Kindermärchen ein?
Sie hat es zwischen den Nationen
Doch nur mit Brückenbau zu tun,
Damit die besser sich verstehen, —
Damit die Waffen endlich ruhn.

Du meinst, es ist nur Wortgeklingel
Und Spielerei, was Du da lernst?
Schon etliche Millionen Menschen
Betreiben das mit größtem Ernst.
Sie haben fast in allen Ländern
Auch schon Kongresse angesetzt,
Wo zwanzig, dreißig Einzelsprachen
Durch diese eine man ersetzt.

Dolmetscher waren dort nicht nötig,
Weil jeder jeden gleich verstand.
Sie wurden alle hier zu Bürgern
Im Esperanto-Zauberland.
Als Menschen kamen sie zusammen
Und Freunde, die sich frei gemacht
Von Grenzen, Rassen und Parteien,
Die so viel Unheil schon gebracht.

Was soll ich Dir noch weiter sagen?
Daß diese Welthilfsprache man
In kurzer Zeit und ohne Mühe
Erlernen und beherrschen kann?
Du solltest selbst Dich überzeugen:
Komm' doch mal mit in den Verein
Und höre zu! Du trägst Dich sicher
Dann auch für einen Kursus ein!

Solvo de la traduktaskoj n-ro 16 kaj 17

Konversacia lingvo: Esperanto

Mondcivitano n-ro 2, Rudi Herzberger, intencas nun fondi „Afrikan Mondŝtaton de liberuloj". Li elektis Abisenion kiel komencregionon por sia projekto.

La nova ŝtato ne havos armeon, sed nur policon. Konversacia lingvo estos Esperanto. Militistaj aŭ politikaj paktoj ne estos farataj; nur ekonomia kunlaborado estas dezirata.

Sed antaŭkondiĉo por la ŝtatfondo estas, ke la projekto trovu kelkajn milionojn da adeptoj.

Das Ziel des Rechts

Das Ziel des Rechts ist der Friede, das Mittel dazu der Kampf. Solange das Recht sich auf den Angriff von seiten des Unrechts gefaßt halten muß — und dies wird dauern, solange die Welt steht — wird ihm der Kampf nicht erspart bleiben. Das Leben des Rechts ist Kampf, ein Kampf der Völker, der Staatsgewalt, der Stände, der Individuen. Alles Recht in der Welt ist erstritten worden, jeder wichtige Rechtssatz hat erst denen, die sich widersetzen, abgerungen werden müssen, und jedes Recht, sowohl das Recht eines Volkes wie das eines einzelnen, setzt die stetige Bereitschaft zu seiner Behauptung voraus.

(Ihering)

Werben Sie EP-Bezieher!

Ĉiukaze grava sukceso por ni!

Tiu vere atentinda sukceso ne estas unu el la **kutimaj** „gravaj sukcesoj": la lasta nacia aŭ internacia kongreso, la favoro de tiu aŭ alia oficiala instanco ktp. Cio ĉi estas grava; sed kiel ofte tiaj okazaĵoj jam trompis niajn esperojn! Mi parolos nun pri sukceso alispeca. Ĝi ne estis sekvo de niaj klopodoj. Ĝi ne estas nia merito.

Tiu plej grava okazaĵo sur la lingva kampo estas la disfalo de la angla lingvo. Unu tipa ekzemplo revokos al ni la fenomenon: la loĝantoj de la brita zono certe memoras la afiŝojn „Off limits" de la trupoj usonaj, kaj ke tiuj afiŝoj poste estis anstataŭataj per aliaj, kiam venis la okupacia armeo angla: „Out of bounds". Du esprimoj por la sama afero: „Eniro malpermesita". — Estas fakto: la angla lingvo hodiaŭ havas amerikan kaj britan branĉojn, kiuj diferencas en multaj vortoj, precipe la slangaj, kaj en amaso da parolturnoj. (La diferencoj inter la diversaj partoj de Britujo en Eŭropo, Aŭstralio, Afriko estas ankoraŭ nekonsiderindaj.)

Tiu disfalo komenciĝis malrapide kaj preskaŭ nerimarkite. Antaŭ dudek jaroj la ĝenerala publiko en Germanujo apenaŭ ion sciis pri ĝi. D-ro Wüster en sia „Internationale Sprachnormung in der Technik" tuŝas la demandon, sed en siaj ekzemploj li apenaŭ iam bezonas fari diferencon inter amerika kaj brita lingvuzoj; eble tion kaŭzis la teknika temo.

La situacio ŝanĝiĝis plene. Hodiaŭ neniu vortaro forgesas atentigi: Kun speciala konsidero de la amerika lingvuzo. Ekzistas eĉ specialaj vortaroj pri amerika angla lingvo; ŝajne ne pri la brita. Ekzistas specialaj gvidlibroj, instruaj revuoj kaj gazetanguloj pri tiu nordamerika lingvaĵo. La popola altlernejo en Kolonjo — kaj kredeble ankaŭ aliloke — aranĝis kursojn: „American English."

Kaj la plej grava fakto estas: **la publiko en Germanujo konscias la disfalon.** Kaj ĉiu unuopulo konscias ĝin des pli, ju pli li enpenetris en la lingvon „anglan", ĉar la fundamentaj vortaro kaj esprimaro estas ankoraŭ la samaj en ambaŭ branĉoj, kaj la diferencoj kreskas kun la nombro de la lernitaj detaloj.

Ke efektive la angla lingvo estas lernebla malfacile, tion konfesis jam ĉiam tiuj, kiuj efektive provis ĝin **majstri.** Tiuj, kies bezonoj estis malgrandaj, kiuj neniam devis fari pli ol balbuti kun anglo kelkajn banalajn frazojn, kaj kiuj poste ĝojbrilante asertis, ke ili parolis (flue) kun „vera anglo", — ili ne estis konvinkeblaj, ke ĉiu nacia lingvo, kaj precipe la angla, estas malfacile lernebla. Ili ja tute ne **rimarkis,** ke iliaj lingvoscioj ne sufiĉas eĉ por letero. Tiuj personoj ankaŭ en estonteco asertos tion saman kaj blinde fermos siajn okulojn ankaŭ pri la nova stato.

Sed ĉiun iom pli seriozan lernanton devos frapi la nun evidenta disfalo de la angla lingvo. Jam en multe pli frua stadio de la lernado ol ĝis nun li devos rimarki, ke la angla lingvo ne estas facila kaj ke lia fervora studado ne tiom progresigos lin, kiom li antaŭ atendis: Tio sendube estas ŝanco por Esperanto kaj por ĝia propagando, kaj ĝi estas ŝanco ĝuste en la rondoj de la instruitoj, kiuj estas rondoj tre gravaj kaj malfacile instigeblaj al lernado de Esperanto. —

Ĉu oni en rondoj **anglaj** juĝas la aferon ankoraŭ malgrava aŭ ĉu ne, aŭ ĉu oni preferas intence silenti pri tiu temo, tion mi ne scias. Oni siatempe — oficiale! — elspezis multe da mono por Basic English; tute sensukcese, kiel oni povas konstati nun. Dume oni neglektis la disfalon de la lingvo mem, kaj mi ne kredas, ke oni povos rekunigi la diskreskintajn branĉojn, nek per mono, nek per alvokoj al la konsciencoj.

El fendetoj dum la lastaj dudek jaroj fariĝis fendoj; kaj tiu disfalo ne haltas kaj ne haltos proksimatempe. Kun la disfendiĝado kreskas la ŝancoj de Esperanto.

Sed aliflanke: kiam oni rigardas tiun ekzemplon liveritan de lingvo natura, jena malnova argumento kontraŭ Esperanto reakiras gravecon: „Esperanto ne povas ekzisti ĉar ĝi tuj disfalos en landajn dialektojn!" Sed dum sesdekjara sperto ni esperantistoj ja ne travivis ion tian. Kompreneble komencantoj — kaj kelkaj restas komencantoj — montras dependecon de sia gepatra lingvo; sed la Esperanta lingvaĵo de bonaj esperantistoj estas sufiĉe homogena kaj apenaŭ montras la naciecon. Disdialektiĝo en Esperanto do ne okazis. Tamen en la angla lingvo. La ĉefa kaŭzo estas certe, ke Esperanto ne estas lingvo popola, t. e. lingvo, kiun amaso da homoj, vivantaj en konstanta interkontakto, lernas neracie sed denaske.

Tiuj malmultaj personoj, kiuj nuntempe lernas Esperanton denaske, tute ne gravas kiel danĝero; kontraŭe, ili estas interesaj „eksperimentaj kunikloj". Kaj se kunlaboranta asocio de UEA alvokas al starigo de „Denaska esperantistaro", ankaŭ tio ne estas danĝero. Iom danĝera estas nur la citaĵo de... Zamenhof, kiu pravigu tiun agadon: „Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptas ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj sensignifa popoleto havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeblan, ol senpopola lingvo, kiun uzas eĉ milionoj."

„Danĝera" tiu citaĵo estas, ĉar ĝi unuflanke entenas tiom da vero kaj aliflanke preterlasas mencii la danĝeran punkton: la disdialektiĝon. „Danĝera" ĝi estas, ĉar multaj esperantistoj konstatadis, ke Zamenhof pravas tiel ofte, kaj tial konkludis, ke li pravas ĉiam, kaj ili nun blinde akceptos lian diron. Kaj ĉi tie Zamenhof efektive aperas kiel fervorega antaŭbatalanto por Esperanto kiel lingvo popola. Sed oni devas pripensi jenon: Zamenhof esprimis tiun opinion en la komenca periodo de la movado kaj en letero. 16jaroj ankoraŭ pasis ĝis lia morto. En tiu tuta tempo li **neniam** parolis publike en tiu senco (lia letero ja estis privata), kaj ankaŭ el liaj ceteraj leteroj ĝis 1917 mi ne konas duan tian lokon. Oni do povas konjekti, ke pli poste li mem kredis sian tiaman konvinkon aŭ malgrava aŭ danĝera aŭ rekte erara.

Oni povas kompreni, ke la UEA-sekcio ŝatas tiun citaĵon; ĝi bezonas devizon — laŭeble de la Majstro — por sia laboro, kaj tiu devizo estis ja tre konvena! Sed kial GEA ripetis la citaĵon en la kalendaro por 1949, estas malklare.

Povas esti, laŭ mia opinio, ke iam **mondlingvo** (do lingvo denaska por la tuta mondo) estos ebla: kiam la mondtrafiko ege intensiĝos kaj laŭ vasta skalo kaj daŭre kontaktigos anojn de la plej diversaj landoj, tiel ke dialektoj tuj ĉe la komenco de la formiĝo estos nivelataj per lingvokutimoj de alilandanoj. Sed **nuntempe** tiu stato ankoraŭ ne estas atingita: tion montras la ekzemplo de la angla. Hans Wingen.

BONHUMORO

Serco el Hamburgo

Kiel oni scias, je dimanĉoj sur komercaj ŝipoj la diservo estas plenumata de la ŝipestro. Post kiam la diserva flageto estas hisita, la ŝipestro legas ĉapitron el la biblio, aldonas kelkajn ĉi-rilatajn admonojn kaj per la Patro-nia finas la diservon.

Nia malnova biblio supozeble iel tuŝiĝis kun peĉo aŭ gudro, tiel ke en iu loko du paĝoj kungluiĝis. Kaj ĝuste tiun lokon hazarde kaptis ŝipestro Jensen iun dimanĉon por sia prediko. Li nome legis por sia kaj nia plej granda miro: „Kaj Jesuo eksidis sur ŝtono kaj (ĉi tie li turnis la paĝon) forflugis."

Ŝipestro Jensen ekhavas grandajn okulojn, returnas la folion kaj eklegas denove: „Kaj Jesuo eksidis sur ŝtono kaj — forflugis."

La tuta kapo de ŝipestro Jensen ekprenas la koloron de lia nazo, li ekpurigas ceremonie siajn okulvitrojn kaj, denove returnmetinte la folion, li legas: „Kaj Jesuo eksidis sur ŝtono kaj — tjes, la diablo min prenu! — forflugis!" A. H.

La juĝa protokolo

Juĝisto (al akuzito): Cu vi edziĝis?
Akuzito: Jes.
Juĝisto: Kun kiu?
Akuzito: Kun virino.
Juĝisto: Ne estu tiel malrespekta! Tio ja estas memkomprenabla.
Akuzito: Ne diru tion, sinjoro juĝisto. Ekzemple mi havas fratinon, kiu edziniĝis kun viro.

ŜERCO — LUDO

Enigma rado

Bonvolu plenigi la rondojn de la figuro per literoj tiamaniere, ke rezultu vortoj kun jenaj signifoj:

1 — 7 fabela monstra besto
2 — 7 detruita konstruaĵo
3 — 7 laborema insekto
4 — 7 kaverno en roko
5 — 7 vira parenco
6 — 7 besto-loĝejo.



Post ĝusta solvo la komencaj literoj de la trovitaj vortoj kune kun la litero de la meza rondo montros kavalerian soldaton.

Pensotasko

Societo de junuloj naĝas en lago. Subite ĉe la bordo okazas neforta eksplodo. La junuloj miras kaj poste ekdisputas, ĉar kelkaj asertas, ke ili aŭdis tute klare du eksplodojn, unu post la alia; la ceteraj junuloj aŭdis nur unu. Kiel vi klarigas tion?

Dekduo da ŝerc-demandoj

1. Kiu estas infano de patro kaj de patrino kaj tamen ne filo de homo?
2. Kiu besto ne estis en la arkeo de Noa?
3. Kion faras la dekdu apostoloj en la ĉielo?
4. Kiu konstruas pontojn sen ligno, ŝtono kaj fero?
5. Kiun nombron oni povas skribi nur per literoj?
6. Kiu grimpas sur arbojn, ne havante piedojn?
7. Ĉu estas eble havi ion en malplena poŝo?
8. Kial la luno aspektas tiel pala?
9. Kiu konas ĝin, ne prenas ĝin; kiu prenas ĝin, ne konas ĝin. Kio estas tio?
10. Kiu havas ĉiam la lastan vorton?
11. Kiu ringo ne estas ronda?
12. Kiu rano havas nur du piedojn?

Elserĉu la pres-erarojn!

1. Si dancis kiel diino dum la bano. 2. Hodiaŭ mi vidis fraŭlinon, kiu estus tre bela, se ŝi ne havus tiel grandan bukon en la vizaĝo. 3. Kiam mi vizitis lin, li sidis sur sia reĝo. 4. Kio estas via plej ŝatata manĝaĵo? Mi preferas rozon kun viando. 5. En tiu ĉi ŝafejo posttagmeze estas dancmuziko. 6. Ĝi razas ĉiun, kiu estas kune kun ŝi.

Solvoj de la enigmoj el n-ro 8

Silab-enigmo

Solvo: 1) pistolo, 2) lito, 3) etudo, 4) nuda, 5) alaŭdo, 6) visto, 7) envio, 8) neologismo, 9) tilio, 10) Rio, 11) ornato, 12) natrio, 13) elefanto.

Plena ventro ne studas volonte.

Krucvort-enigmo

Horizontale: 1. Lan, 3. are, 5. ind, 7. mi, 9. et, 10. du, 11. en, 12. ke, 14. ul, 16. ari, 18. nun, 19. neĝ.

Vertikale: 1. Lam, 2. ni, 3. ad, 4. est, 6. nu, 8. ide, 9. enu, kon, 13. or, 15. loĝ, 16. an, 17. in.

Vizitkart-enigmo: metallaboristo.
Hans Fricke, Frankfurt a. M.

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

„Wir lernen Esperanto" ist wieder da!

Die dritte Auflage dieses begehrten und bewährten Lehrbuches liegt jetzt fertig vor. Das Buch ist nach den Erfahrungen der letzten Jahre weiter vereinfacht und verbessert worden. Zur leichteren Handhabung ist noch ein besonderes Wörterverzeichnis eingelegt. Auch die äußere Ausstattung entspricht dem neuesten Stande der Graphik und Drucktechnik. Dabei ist es gelungen, den Preis herabzusetzen: Es kostet nur noch 2,— DM zuzüglich Porto.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH
Limburg/Lahn

Kuirujoj, mastrumilaro,
mastrummaŝinoj,
fornoj por karbo kaj gaso

Demandu prezojn

Walter Rose
Hagen/Westfalen
Auf dem Birnbaum 5

„Unser Weg"

lautet das Stichwort eines neuen Flugblattes, das wir den werbenden Esperantisten anbieten können. Im Format Din A 5, zweiseitig, wirkungsvoll im Aussehen und in der textlichen Zusammenstellung.

Preis: bis 500 Stück 3 Pf, über 500 Stück 2 Pf

Bestellen Sie für Ihre Herbstwerbung bei der Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

das neue Flugblatt

Der große Erfolg unseres Flugblattes

Esperanto auf einem Blatt

veranlaßt uns, den Preis zu senken, und damit bietet sich allen die Möglichkeit, noch billiger für Esperanto zu werben.

Ein Blatt kostet:
bis 100 Stück 4 Pf
100 bis 500 Stück 3,5 Pf
über 500 Stück 3 Pf

Benutzen Sie diese günstige Gelegenheit für die Herbstwerbung Ihrer Gruppe.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn